

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ N-ro 5 (836) 2002 ✧



La kongresanaro antaŭ muzeo en Debrecen (fotis PC)

LIMOJ
nia kogresa temo

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun
UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH
Heemskeerck ☎+31 251 231941;
✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎+31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎+49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €20,- ☉ Membro-subtenanto
€30,- ☉ Nura abono: pagante rekte al KELI
€16,- ☉ pagante al Libroservo €18,- Sendoj
de okcidentaj monbiletoj per registrita letero
al la kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando
UEA—poŝtgirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p**
de KELI ☉ Nederlanda poŝtgirkonto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonkostoj pagotaj al
la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
repro aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+4832 2650038; ✉ esperanto@hejme.e-tools.pl

ENHAVTABELO

- 99 TRAPASI LIMOJN
Rusa kontribuo al la kongresa temo
- 104 LA INTERRELIGIA DIALOGO
La situacio en franca urbo
- 108 LA KREDO ESTAS DONACO DE DIO
Historio de la unitarianoj
- 110 LA HOMA RESPONDECO ESTAS LIMIGITA
La limoj el la kreo

REDAKTORAJ VORTOJ

Vi ricevas spurojn de kongreso, kiun vi
eble mistrafis. Tiukaze, ne tro zorgu, mul-
taj estas kia vi estas.

La rakonto kaj raportoj venos en posta
numero. Nune vi povos legi kelkajn el la di-
versaj kontribuajoj, kiuj riĉigis nin dum tiu
ĉi semajno.

Nia temo **Limoj** prezentigis sub tre va-
riaj aspektoj. Alvenonte, ni ne povis imagi
la eblecojn de ĝi. Ni tre dankas al la kontri-
buintoj, ke ili malfermis al ni vastajn hori-
zontojn, tiel vastajn kiel tiu de la pusta.

Ĉiujare, kelkaj personoj kolektas bildojn
kaj paperojn el la kongreso. Se vi faris fo-
tojn, rememoru sendi plurajn al ili, ekzem-
ple al Elizabeta KASZAB, kies adreson vi tro-
vas en viaj dokumentoj. Mi devas ankaŭ al-
doni, ke la fotoj kiujn mi faris estas tro ofte
misfaritaj, ĉefe tiuj kun fulmlumo. Mi do
esperas de vi, ke ankaŭ mi ricevu por la re-
vuo fotojn.

En pluraj landoj de Eŭropo estos venon-
tjare la **Jaro de la Biblio**. Mi atendas de vi
kontribuajojn por la revuo kiuj rilatas al tiu
temo (daŭre ankaŭ al aliaj, se ili estas pre-
taj).

Ĝis la revido en iu kongreso, eble.

Philippe COUSSON

Kontribuo al la kongresa temo

TRAPASI LIMOJN

Karaj gefratoj, karaj gesamideanoj!

En tiu ĉi jaro temo de nuna kongreso
estas tre ampleksa kaj interesa. Mi alve-
turis el lando, kiu ĝis nun por multaj ho-
moj, kaj eĉ por geesperantistoj estas ek-
zotika lando, nome Ruslando.

Multaj el vi vivas en mondo, kie limoj
inter landoj ekzistas por normalaj homoj
ofte nur sur la mapoj. Kaj de la 1a de ja-
nuaro de tiu ĉi jaro multaj eŭropaj land-
oj uzas komunan valuton, kaj ni uzas eĉ
komunan lingvon Esperanton kaj bone-
ge komprenas unu la alian, ĉu ne?

Sed mi pensas, ke vi kun malfacilaĵoj
povas imagi esprimon el buŝo de rusi-
no: Mi bonorde atingis Berekfürdön (aŭ
Montpelieron, aŭ Berlinon, kie mi ankaŭ
jam estis), por partopreni en Esperanto-
kongreso kaj pro tio trairis 2 (aŭ eĉ fo-
je 3) rimarkeblajn limojn.

Mi pensas, ke estas tre interesa al
vi, kiom ĝenaj limoj povas esti kaj ke
miaj travivaĵoj el la vivo priskribas unu
aspekton de nia kongresa temo.

Mi volas nun prezenti al vi miajn tra-
vivaĵojn koncerne la temon „Limoj” kaj
dividis mian prelegon en tri diverslon-
gajn partojn.

Unuafoje mi vojaĝis eksterlanden
en 1995, kaj certe, danke de Esperan-
to. Ĉar mi en unua fojo de mia vivo tra-
pasis limon de Ruslando, por partopre-
ni en Universala Kongreso de UEA en
Tampere. Tiam tio estis sufiĉe simpla
afero, ĉar en 1995 Finnlando ne postu-
lis vizojn de rusoj. Poste mi povis vojaĝi
por partoprenado en UK en Montpelie-
ro, en Berlino kaj aliaj same tre intere-

saj vojaĝoj al okcidenta Eŭropo surbaze
de Esperanto. Kaj ĉiam mi krom agra-
blaj impresoj ricevis ankaŭ novajn sper-
tojn danke al lecionoj de „estimataj” do-
ganistoj kaj limgardistoj.

Bedaŭrinde, dum la lastaj 5 jaroj si-
tuacio en mondo kaj alta politiko ŝanĝ-
iĝis. Kaj nun praktike ĉiuj landoj, kiuj
ankoraŭ en 1997 havis malfermitajn lim-
ojn, kaj do por vojaĝantoj el Ruslando su-
fiĉis havi nur validan eksterlandan pas-
porton por vojaĝoj ĝis limoj de Schen-
genaj landoj, nun ankaŭ fermis limojn.
Eble al vi estas Schengena lando nekona-
ta esprimo. Ĝi devenas de urbo Schen-
gen, kie antaŭ kelkaj jaroj la ŝtatestroj de
Eŭropa Unio kontraktis, ke ili la inter-
najn limojn reciproke malfermas kaj pli
severe gardas la eksterajn limojn kontraŭ
krimuloj kaj ekonomiaj fuĝantoj. Kaj
nun landoj, kiuj baldaŭ eble ankaŭ vo-
las esti Schengena lando, do membro de
Eŭropa Unio, nun por vojaĝo en Hun-
garujon, Slovakujon, Ĉeĥujon, Bulga-
rujon, ordonis, ke rusaj civitanoj devas
havi vizojn, dume Pollando „inventis”
alian metodon. Kaŭzojn de tiu ĉi situ-
acio ni ne plu diskutu, ĉar ili, certe, ek-
zistas kaj bedaŭrinde pro ili suferas ho-
nestaj homoj, sed ne krimuloj, kontraŭ
kiuj registaroj pripensis tre severajn re-
gulojn por enirado en landoj.

Por ke mi povu partopreni la nunan
Ekumenan Esperanto-Kongreson kaj
por ke vi povu vidi min antaŭ vi, certe,
mi bezonis minimume vizon, kiu per-
mesus al mi enveturi Hungarujon. Por
tio oni postulas antaŭe havi en miaj ma-

noj oficialan invitilon. Tio ĉi estas dokumento, kiun en Hungarujo plenumas aŭ privata persono, aŭ oficiala organizkomitato pri tio, ke ili invitas personon el Ruslando kaj montras por kia celo, kaj garantias, ke invitita persono havos tranoktadon, nutradon, ne serĉos laboron kaj ĝustatempe forlasos Hungarujon. Mi ne konas pluajn detalojn, sed mi ne dubas, ke tio estis nekutimaj aferoj en la koncerna oficejo, postulitaj de estimata kaj kristana fratino Ēva FĀRKAS, kiu plenumis invitilon por mi, nome multe da tempo, fortoj kaj sano. Mi kore dankas ŝin, ke ŝi ĉion eltenis kaj atingis plenan sukceson post 3 monatoj, kiujn postulis plenumado de invitilo!!!

Verŝajne, Hungaraj oficejoj tre atente kontrolas honestecon de eventualaj envojaĝantoj, ĉar reguloj pli kaj pli ŝanĝas kaj pli severiĝas. Ekzemple, en tiu ĉi jaro ili postulis de Ēva montri eĉ familnomon (inkluzive virgulinan) de mia patrino, kiu mortis jam antaŭ 20 jaroj. Kaj intertempe, saman demandon mi ekvidis en enketilo, kiun mi plenumis jam en Hungara ambasadejo en Moskvo.

Sed kiam rusa civitano finfine havas en manoj deziratan kaj longe atendatan invitilon, kiu donas al li (aŭ ŝi) rajton peti ambasadejon plenumi vizon por vojaĝo, tio ĉi estas nur komenco de longa vojo kaj diversaj ne antaŭvideblaj aventuroj.

Nun mi skizu al vi mian vojon de mia loĝloko al Bereĥfŭrdő.

Ne estas sekreto, ke Ruslando estas vasta lando. Sed ambasadejoj de ĉiuj landoj troviĝas en sola urbo de Ruslando: Moskvo. Konsulejoj ankoraŭ troviĝas en Sankt-Peterburgo, kaj, ekzemple Germanaj konsulejoj ankoraŭ troviĝas en kelkaj aliaj urboj de Ruslando. Sed, bedaŭrinde, ne ĉiuj rusoj loĝas en Mo-

skvo kaj S-Peterburgo aŭ apud necesa konsulejo. Mi, ekzemple, vivas en urbo Taganrogo, ĉe la bordo de Azova Maro kaj rekta distanco de Moskvo estas 1500 km. Pere de fervojo mi bezonas preskaŭ tagnokton, por atingi Moskvon.

Uzi poŝton aŭ servon de vojaĝagentoj ne eblas. Unue, kaj Germana, kaj Hungara ambasadejo postulas plenumi vizon persone, por ke dungistoj de ambasadejoj povu propraokule taksii aspekton de eventualaj gastoj el Ruslando. Due, vojaĝagentejo postulas pagi pro iliaj servoj tri aŭ eĉ kvinoblon kompare de pago pro vizo rekte al kaso de ambasadejo kaj bezonas por plenumado minimume 3 semajnojn.

Mi ĉiam emas plenumi vizojn eble sufiĉe frue, dum tempo ne alloganta por vojaĝantoj: februaro, marto kaj maksimume komenco de majo, ke vicoj apud ambasadejo estas eble pli mallongaj. Mi jam travivis okazon, kiam en 1999, mi veturis al Moskvo, por mendi vizon por vojaĝo al Berlino por partopreni en UK, mi ne povis eĉ eniri la germanan ambasadejon dum 4 tagoj, malgraŭ, ke mi uzis unuan trajnon de metroo kaj estis antaŭ pordoj de ambasadejo jam en 6.30 h. matene. Mi devas diri, ke germana ambasadejo, malgraŭ mondkonata germana akurateco kaj atenteco ĉiafoje pripensas ion novan. Kaj mi ĉiam tre zorgeme preparas dokumentojn por plenumado de Ŝengena vizo en germana ambasadejo, sed ĉiam io mankis. Se dungisto en ambasadejo estis kontenta de la dokumentoj kaj akceptas ilin, kutime via vizo estos preta post 2 tagoj. Se vi tre urĝas, en Hungara ambasadejo ekzemple vi povas aldone pagi ankoraŭ 15\$ kaj ricevi vizon en la sama tago posttagmeze. Certe, se kvanto de dezirantoj ricevi vizon ne estas tro granda.

Plenumi Schengenan vizon estas malfacila tasko, precipe pro tio, ke dungistoj krom tre atenta kontrolado de dokumentoj havas ankaŭ tre tiklajn demandojn al via adreso. Min, ekzemple, oni demandis, kia estis kaŭzo de mia divorco. Sed ne dubu, neŝengenaj landoj, ekzemple Hungarujo, estas ankoraŭ pli lertaj, por pliseverigi kondiĉojn por plenumado de vizo por enveturado en ĝi. Por mi mem okazis praktike neplenumita kondiĉo montri en ambasadejo fervojbiletojn tien kaj reen. Mia urbo troviĝas nur 60 km distance de Ukrainia limo. Kaj mi ĉiam veturas al okcidenta Eŭropo tra Ukrainia urbo Lvov. Kaj biletojn mi ankaŭ povas aĉeti nur tie. Okulfrape, mi ankaŭ ne povas aĉeti biletojn 3 monatoj antaŭe ĝis mia vojaĝo, en kazo de fremda lando!

Feliĉe, ke mi havas geamikojn en Esperantujo, kaj hazardoj ne ekzistas. En pasinta jaro prezidanto de Hungara E-Asocio estis iama ambasadoro de Hungara Respubliko en Moskvo. Kaj ĉar mi, modesta persono, povus plenumi vizon pro vojaĝo en Hungarujon, ne havante biletojn, mia hungara Esperanto-amikino rakontis pri mia situacio al li. Kaj li diskutis tion kun nuna konsulo de Hungara Respubliko en Moskvo. Poste mi pere de telefono klarigis ĉion pli detale al nova konsulo kaj finfine ĉio estis orde. Vere, dungistino, kiu akceptis miajn dokumentojn kaj rimarkis, ke mankas biletoj, demandis min kial, kaj mi respondis, ke s-ro konsulo permesis al mi tion, ŝi povus eĉ kontroli ĉe li, ĉu mi mensogas aŭ ne. Kaj ŝi vere foriris. KREDU min, kiam ŝi revenis, ŝia vizaĝo estis ankoraŭ pli ridema kaj afabla.

Nu, do. Mi havante en manoj ĉiujn necesajn dokumentojn kun vizoj por vojaĝo kaj eniras je la 1a horo post mez-

nokto trajnon, kiu transportos min ĝis Lvov. Unua kontrolado okazos ĉiam jam post 1a horo, kiam kontrolas ruslandaj doganistoj kaj limgardistoj. El mia sperto mi scias, ke mi nepre devos kapti doganiston, por ke li subskribu mian deklaron. Ĉar ĉia enhavaĵo de mia monujo transformos en Ukrainio en valuton kaj mi devos klarigi jam al ukrainiaj doganistoj, kial mi havas fremdan valuton. Dum kontrolado de ukrainia flanko, mi devos kapti limgardiston, por ke li nepre stampu, ke mi eniris Ukrainion kiel transita pasaĝerino kaj montru ĝustan daton, kiam tio okazis. Mi jam travivis historion, kiam mi ne kontrolis ĉiujn stampojn kaj dum pasporta kontrolo sur la Ukrainia-Pola limo okazis, ke mi ne havante stampon en pasporto nek pri tio, ke dum antaŭa vojaĝo mi forlasis Ukrainion, nek pri tio, ke mi nun transite eniris, kaj okazis, ke mi kvazaŭ dum 9 monatoj troviĝis en Ukrainio. Kaj limgardistino postulis, ke mi devas pagi multekostan monpunon. Feliĉe, min savis du obstakloj: mi havis bileton, laŭ kiu mi eniris per trajno nur hieraŭ kaj tio okazis en Ruslanda urbo Taganrogo, kaj mi demandis limgardistojn, kiu devis stampi mian pasporton siatempe, ke mi forlasis Ukrainion kaj ke mi eniris en Ukrainion nur hieraŭ kun bileto kiel transitulino? Kaj ili respondis, ke kulpas ukrainiaj limgardistoj, kiuj kontrolis pasportojn dum kontrolado sur la Rusa-Ukrainia limo, kiam mi eniris en Ukrainion. Post tiu ĉi travivaĵo mi ĉiam nun tre atente kontrolas mian pasporton, ĉu ĉiuj stampoj sufiĉas kaj estas en ordo kaj ĉiam konservas biletojn survoje.

Krom tio, ankaŭ estas necese scii, kiajn varojn vi povas transporti kaj ĝis kia sumo, kaj kiaj dokumentoj devas adapti tiajn varojn ktp.

Feliĉe, mia aspekto ĝis nun faris bonan impreson kaj je la limgardistoj, kaj je la doganistoj kaj eĉ je policistoj en landoj de okcidenta Eŭropo. Do mi dume ne havis malfacilaĵojn. Vere, mi ĉiam tre atente kaj detale sekvas al ĉiuj postuloj kaj reguloj. Nun vi scias, ke trapasi limojn inter landoj por mi estas sufiĉe malfacila afero.

Intertempe, plenumi invitilon, ke al Ruslando veturus okcidentuloj estas tre ege pli facile, nur postulas atentotempoj de minimume 1 monato en Ruslando. Sed multegaj homoj faras tion, rifuzi limojn inter koroj kaj animoj. Por tio ĉi ekzistas diversaj vojoj. Kaj unu el ili montri al fremduloj tion, kio estus klara kaj sen sciado de lingvo.

En dua parto de mia prelego mi tuŝas iomete alian flankon koncerne de kongresa temo „Limoj”.

Mi ankaŭ travivis dum 2 koncertvojaĝoj, kiam mi kaj miaj germanaj Esperanto-geamikoj organizis koncertojn de ĥoro el mia urbo Taganrogo en Aalen (Germanio) kaj ties proksimaj vilaĝoj; Nürnberg kaj eĉ Lüdenscheld (la lasta urbo estas ĝemela urbo de Taganrogo).

Ĝeĥoranoj por unua vojaĝo preparis liturgion de Sankta Orabuŝa Kristostomo kaj ankaŭ rusaj popolaj kantoj, aranĝitaj por ĥoro. Dum dua vojaĝo germana publiko aŭskultis rusan eklezian muzikon kaj jam konatajn kaj novajn rusajn popolajn kantojn.

Mi povus longe rakonti al vi, kiajn problemojn ni havis, por komprenigi, kiajn ekleziajn preĝojn enhavas la liturgio de la rusa ortodoksa rito kompare kun ekzemple kutima luterana liturgio. Io kiel ekzemple „Kredo”, aŭ „Patro nia” estis absolute klara. Ion mi devis traduki sublinie kaj nur poste laŭ senco serĉi si-

milajn preĝojn kaj ekleziajn kantojn en luterana eklezio. Ambaŭfoje ĥoro partoprenis en Paskonoktaj Diservoj en la plej granda Luterana preĝejo al Sankta Nikolao de urbo Aaleno. Kaj vi ne povas imagi, kia kortuŝita kaj bela etoso estis dum tiuj ĉi diservoj. Kiu povus imagi, ke estas ebla, ke rusa eklezia muziko sonoros sub tegmento de antikva germana preĝejo dum diservo de alia konfesio. Kaj ĝi penetris en animojn kaj korojn de homoj kaj mi esperis, ke tio faris ilin pli bonaj kaj pli puraj!!! Kaj tiam neniu pensis, ke ekzistas limoj inter niaj landoj, niaj viv- kaj pens-manieroj, niaj kulturoj. Montriĝis, ke muziko estas internacia kaj certe povas mildigi la sekvojn de limoj.

En mia lasta parto mi volas atentigi nin, ke la kongresa temo „Limoj” estas bone elektita. Mi forte pensas, ke ni kristanoj havas komunan taskon: malkonstrui limojn inter homoj kaj ilia religia interkompreno. La libro „Adoru” por kredantoj estas unika libro, ĉar ĝi enhavas diservajn ordojn, preĝojn kaj ekleziajn kantojn de ĉiuj mondkonataj kristanaj konfesioj sub unu kovrilo. Kaj ĉiuj posedantoj de tiu ĉi libro povas propraokule ekvidi, ke tiuj, kiuj volas kompreni aliojn kaj rifuzi ankoraŭ ekzistantajn limojn malhelpantajn, ĉiam povas argumenti laŭ tiu libro. Ne ekzistas io nebla kaj al ni ĉiam helpas nia kara Lingvo Esperanto! Mi ne kuraĝas abunde ekdiskuti jam nun Ekumenon facile ebla sub Esperanto kaj „Adoru”. Sed mi sentas en mi interne, ke ni serĉu ireblan vojon de spirita unuiĝo sen perdo de tradicioj, niaj konfesioj havas. Mi esperas en tiu interesajn prelegojn kaj pripensojn al ni ĉiuj kaj mi kore dankas pro vi afabla publiko.

Irina UDALOVA (Taganrogo)

ULRIKE TREUSCH DUM LA ADIAŬA MATENPREĜO DE JACQUES, SABATON, KELI-KONGRESO EN BEREKFÜRDŐ

La kongreso ĉi tie en Berekfürdő estas mia dua kongreso kaj la unua KELI-kongreso post la Ekumena kongreso pasintan jaron en Zagreb.

Kiel KELI-kongres-komencantino mi permesas al mi fari du rimarkojn: unue pri la temo, due pri la etoso.

Unue: La temo „limoj”, traktita en diversaj formoj (en prelegoj, preĝoj, diservoj) kaj rigarde diversajn aspektojn (ekzemple landlimoj, limoj inter homoj, limoj de kapableco), kortuŝis min. Kvankam la kongreso finiĝos hodiaŭ, la temo „limoj” ne finiĝas por mi.

Mi ankaŭ sentis miajn limojn dum la kongreso, ne nur la limo de Esperantlingvosocio, sed ankaŭ spirite-teologie:

Aŭskultinte la prelegon de Julia kaj la sekvantan diskuton pri la Unitarianoj, mi demandis min, kie por mi estas la limo de kristana komuneco, de kristana eklezio.

Sed — dua rimarko — ĉi tiu prelego kaj aliaj prelegoj ankaŭ estis por mi signo de ĝenerala etoso, de animstato ĉi tie: Kvankam kelkaj el ni redemandis skeptike kaj kritike pri la prelegtemo de Julia, ĉiuj klopodis kompreni la alian opinion kaj aspiris akcepti la alian kaj ties konvinkon. Estis la spirito de komuneco kaj toleremo — sperti ĉi tiun tipe Esperantan spiriton estis por mi la plej granda ĝojo!“

Ulrike TREUSCH

ĈE LA LIMO

Estas limoj inter homoj,
estas limoj inter ni.
Ĉu estas pro la lingvoj,
ĉu estas pro kolor’?

Ĉi tie ĉe la limo
sur tero staras mi.
En la alia flanko
samtere staras vi.

Kiel estas viaj pensoj
kaj via opini’?
Vi amas vian landon,
kun via famili’?

Ĉu vi foje timas
pro povo kaj milit’?
Ĉu la infanoj viaj
revas pri manĝinvit’?

Ĉu vi rajtas kredi
kaj preĝi al Jesu’?
Vi certe volas pensi
libere pli kaj plu.

Mi volas lasi timon,
renkonti kun respekt’
por viaj cirkonstancoj
kaj via dialekt’.

Ni povas kune preĝi
por paco kaj konkord’,
forpreno de la limoj,
malfermo de la pord’.

Jesuo, nun ni venas
kun preĝo antaŭ vi.
Ho, benu nian mondon
kaj venu inter ni!

Anna LANDFORS

LA INTERRELIGIA DIALOGO

Antaŭ ol paroli pri la nun ĉiujara renkontiĝo interreligia en Poitiers, mi devas por la ne-francoj diri kelkajn aferojn, kiuj povas klarigi la tipan francan situacion rilate religion.

Vi ĉiuj scias, supozeble, ke la plimulto de la Francoj estas almenaŭ teorie Rom-Katolikoj. Tio estas la konsekvenco de longa historio, kiun mi skizos. En Gaŭlion, aŭ pli ĝuste en romian Gaŭlion, rapide envenis kristanismo. Martiroj mortis, ekzemple Blandina en Liono. Estis ankaŭ fame konataj Hilario, episkopo de Poitiers, kaj defendanto de ortodokseco, lia amiko Marteno, episkopo de Tours (tur). Sude de Francio kaj en Hispanio regis la Visigotoj, kiu estis arianoj. Ili estis atakitaj kaj venkitaj de la Franka reĝo Klodvigo, ĝuste apud Poitiers. Tiu „barbara” Franko, ne estis ariano sed ankoraŭ pagano, sed Klodvigo, post la konkero de la lando, baptiĝis al katolikismo. Ne forgesu, ke kalkajn jardekojn poste, ĝuste en la proksimeco de Poitiers okazis la haltigo de la Araboj per Karlo la Martelo. Lia pranepo, la imperiestro Karlo-la-granda estigis Koncilion, kaj inter aliaj aferoj la faman *filio-que*. Vi ankaŭ aŭdis pri Johana de Arc (ark), kies komisio estis agnoskita precize antaŭ la universitato de Poitiers.

Post kelkaj epizodoj antaŭaj (la krucmilititaj kataroj, la valdanoj), aperis en Francio ankaŭ la Reformacio, en la formo de kalvinismo. Sufiĉe granda parto de la Regno, sed ĉiam malplimulto, transiris al la nova formo de krista-

nismo, en kelkaj regionoj en konsiderinda proporcio, interalie kelkajn dekojn da kilometroj sudokcidente de Poitiers. Pro tio okazis militoj pro libereco, kiuj finiĝis per la edikto de Nantes, kiu instalas la ŝtaton super la religioj. Sed unu jarcenton poste, post iompostioma manĝetado, la edikto estis nuligita per alia edikto, kiu instalas nur katolikiŝmon kiel ŝtatan religion. Fuĝoj, mortigoj kaj remadoj, ribeloj. Unu jarcenton poste, du jarojn post nova edikto, de toleremo, okazis alia tre grava evento en la franca historio, la Revolucio. Kvankam la Revolucio proklamis religian liberecon, katolikismo elektis konservatismon kaj la reĝan sistemon, kaj fariĝis kontraŭrevolucia. La nova ŝtato do luktis kontraŭ katolikismo, fakte kontraŭ religio. Kaj tio ardis dum la Teroro. Napoleono Bonaparto (Napoléon BONAPARTE) pacigis la religiojn en Francio per la Konkordato, kaj ĉion kontrolis. Venis poste la Restaŭrado en kiu denove gravis katolikismo kiel ŝtata religio. Okazis kelkaj aliaj revolucioj, dua imperio, tria respubliko. Kaj fine de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a jarcento, Francio estis dividita en du ĉefaj partoj, la konservativuloj, katolikoj, kontraŭdreyfusanoj unuflanke, kaj la kontraŭklerikaranoj, senreligiaj, dreyfusanoj aliflanke. Protestantoj ĝenerale, kvankam kredantoj, situis en la dua parto.

En tiu kadro estiĝis la leĝo de 1905, pri disiĝo de religioj disde la ŝtato, ĉar ĝis nun validis la ŝtata kontrolo pro la

napoleona konkordato. Tiu leĝo, krom ke ĝi donas regulojn al la vivo de la religioj, komplete disigas ilin de la ŝtato. „La ŝtato nek agnoskas, nek salajras iun kulton”. La katolikoj rifuzis tiuepoke tiun leĝon, kiun entuziasme akceptis protestantoj kaj judoj.

Pri tiu situacio oni uzas en Francio la vorto laika. Sed tiu vorto havas en franca buŝo tute specifa signifo. Tio estas: kiu ne havas rilaton kun religio, kiu ne ricevas influon de religio. La ŝtato estas laika, la lernejo estas laika, la armeo estas laika. Laŭ mia scio nur du aliaj ŝtatoj tiel funkcias, nome Meksikio kaj Turkio.

Nuntempe, tiu termino havas ankoraŭ plenan signifon. Pri ĝi okazis politikaj bataloj antaŭnelonge, pri la lerneja sistemo plej ofte. Inter la „liberpensuloj”, estas kelkaj kiuj pensas, kaj asertas ke la religioj ĉiam estas kaŭzoj de problemoj, de konfliktoj, de trompo, ke ilia malapero estus granda bono por la homaro, granda liberiĝo.

Sed la situacio evoluis, kaj kiam oni volis establi etikan komitaton, por konsili la registaron, oni vokis en ĝin, krom sciencistojn kaj filozofojn, ankaŭ religiajn respondeculojn kune kun framasonoj. Eĉ estas nun esplorata kiel enkonduki en la lernejon historion de la religioj, aŭ religian kulturon, por ke la junaj Francoj povu kompreni i.a. siajn monumentojn kaj artaĵojn.

Antaŭ ol alveni al la situacio, mi devas ankaŭ skizi la situacion de islamo en Francio. Dum pli ol jarcento, Francio okupis kaj koloniis la nordan parton de Afriko. Post diversmaniera malkoloniigo, inkluzive de sufiĉe drama milito en Alĝerio, tiuj tri landoj sendependiĝis, sed la fluo al Francio de laboristoj, poste de familioj neniām ĉesis. Al tiuj aldoniĝis rifuĝintoj el Alĝerio, kaj nu-

ne ankaŭ el aliaj islamaj landoj. Kaj la familianoj, dua generacio, do Francoj, daŭre estas islamanoj. Nun islamo estas la dua religio en Francio, post katolikismo, sed antaŭ protestantismo. Islamo en Francio estas ne organizita, kion bedaŭras la ŝtato, ĉar ĝi trovas preskaŭ neniun por interrilati. Fakte, la loka moskeo dependas de la mondonacanto, t.e. Alĝerio, aŭ Saŭdarabio, ktp. Diversaj federacioj aperis, de diversaj tendencoj. La registaroj unu post la alia instigas la francajn muzulmanojn organiziĝi en federacia strukturo. Eĉ oni planis balotojn. La celo fakte estas duflanka: unue havi vidalvidulon por la registaro, kaj due starigi nacian islamon, disigitan de la islamaj fremdaj registaroj. Konsekvenco de tiu neorganiziteco estas, ke inter la „perditaj junuloj” de la ĉirkaŭurboj, la ekstrema islamo (aŭ islamismo) faras adeptojn, malgraŭ la paroloj de la islamaj respondeculoj.

Post tiu ĝenerala skrizo pri la religia historio de Francio, mi iomete priskribos la religian situacion de la urbo Poitiers.

La urbon superstaras statuo de la Virgulino. Poitiers estas katolika urbo, kun deko da romkatolikaj preĝejoj: la katedralo kompreneble, kaj ankaŭ kelkaj famaj pro romanika arkitekturo, ĉefe Notre-Dame, Saint-Hilaire (Sankta Hilario), Sainte-Radegonde (Sankta Radegunda) kaj Montierneuf. La urbo estas sidejo de episkopo, de tre longe (jam antaŭ Hilario).

La urbon vizitis Kalvino. Oni diras ke ĉi tie li celebris sian nuran celebritan Sanktan Manĝon. Restas la tiel nomata Groto de Kalvino. La komunumo estis rapide fondita, starigita, ktp. Sed ĝi malaperis post la Nuligo de la Edikto de Nantes. Nur en la 19-a jarcento, ĝi denove aperis.

Oni trovas en la urbo ankaŭ aliajn protestantajn komunumojn: baptistan, pentekostanan, adventistan, diversajn aliajn evangelikajn. Mi ankaŭ devas aldoni du „fremdajn” komunumojn, nome Presbiteriana Korea Eklezio, kaj Protestanta Malagaŝa Eklezio, kiuj kunvenas en la reformita preĝejo. Okazas renkontiĝoj de pluraj el inter la eklezioj de protestanta deveno.

Ekzistas ankaŭ ortodoksia komunumo, kun kristanoj originaj el rusa, greka, araba aŭ balkanaj eklezioj. Kune kun la katolikoj kaj la Reformitoj (Kalvinanoj) ili konsistigas la „ekumenan” grupon.

Krome ekzistas unu Franca Katolika Ortodoksa Eklezio.

Ekster kristanismo troviĝas en la urbo ankaŭ juda komunumo. Fakte, la teritorio de tiu komunumo ampleksas multe pli ol la urbo. Ĝi estas malgranda komunumo, kun eta diskreta sinagogo. La moskeo ankaŭ estas diskreta, sed la islama komunumo sufiĉe viva. La komunumon konsistigas laboristoj, studentoj kaj intelektuloj.

Kun la romkatolikoj kaj la reformitoj, tiuj du aliaj monoteismaj religioj konsistigas la interreligian grupon, kiu preparas la renkontiĝon.

Ankaŭ en la urbo aktivas baha'a grupo. Kaj en la ĉirkaŭaĵo ekzistas budhista centro.

Krome, troviĝas ankaŭ diversaj sektoj, kultoj, ktp., ekzemple, la Atestantoj de Jehovo, la Mormonoj, la Antoniistoj. Antaŭ kelkaj jaroj, mi eĉ ricevis la viziton de adepto de Kriŝno. Kaj mi certe forgesis kelkajn. Eble Rozkrucaĵoj, ĉar de tempo al tempo okazas prelego.

Post tiu bunta religia portreto de Francio kaj de la urbo, jen kelkaj historiaj elementoj pri la Interreligia Kunveno de Poitiers.

La origino de tiu kunveno troviĝas en la renkontiĝo de Asizo, 1986. Unu jaron poste, la tiama episkopo, Pastro ROZIER (rozje) petis la respondeculon de „Pax Christi” organizi renkontiĝon interreligian en la urbo. Kaj tiun respondeculon, kelkaj el vi konas. Temas pri Pastro René GIRAULT (röne jiro), kiu krom tio antaŭ kelkaj jaroj refariĝis esperantisto, kaj partoprenis en Nantes. Tiu kunveno fariĝis ĉiujara, laŭ kelkaj kriterioj: - prizorgitaj de la kvar malnovaj „abrahamidaj” religiaj komunumoj en la urbo; - ne temas pri diskutoj aŭ debatoj; - ne temas pri preĝkunvenoj; - sed estas kunvenoj de frata dialogo, en spirita etoso.

La tri unuaj kunvenoj estis „privataj”, kun limigita nombro da partoprenantoj: oni prezentis sin kaj parolis pri paco. Partoprenis romkatolikoj, reformitoj kaj judoj.

La kvara kunveno estis publika, ligita kun urba evento pri paco, en urba salono. Parolis katoliko, reformito, judo, kaj ankaŭ muzulmano el Parizo.

Post tiu komenca periodo, la ciklo povis komenciĝi. Unu komunumo akceptas la kunvenon, organizas materio, formas kaj varbas. Kvar prelegantoj estas nomumitaj, temo estas elektita. Ĉiu preleganto parolas dum ĉirkaŭ 8 minutoj, kaj post paŭzo, ofte muzika, la aŭskultantaro povas demandi per paperetoj, kaj la tabloj respondas. La vespero finiĝas per bablado ĉirkaŭ trinkaĵoj kaj kukoj.

Mi listigas la temojn pritraktitajn: - La serĉo de paco en respekto de la alia, - la religioj, faktoroj de milito aŭ fontoj de paco, - La religioj naskitaj el Abraham en nia hodiaŭa socio, - Religiaj valoroj, fontoj de espero, - Kiel akordigi religian liberecon kaj disvastigon de sia kredo? - Religiaj plimulto kaj malplimulto: kvar

atestoj, - Niaj religioj antaŭ la nuna serĉo pri sanktaĵo, - Kiuj familiaj ĉeloj kaj ĝis kie? Niaj religioj respondas, - Niaj religioj kaj iliaj malpermesoj, - Religio kaj politiko: ĉu la debato fermiĝis?

La evoluo en la formo kaj enhavo estas nun sentebla. La kuriozeco de la komenco malaperis iom post iom. Tio videblas en la demandoj post la prelegoj. En la komenco, la demandoj montris multe da nescio kaj antaŭjuĝo pri la alia. Nun la demandoj estas pli rilataj al la temo kaj ankaŭ al la aktualaĵoj. La nombro stagnas de kelkaj jaroj. La unuajn jarojn, la loko ŝanĝiĝis, la ejo estis markita, katolika salono, salono apud la sinagogo, reformita salono, urba salono apud la moskeo. Sed ĉar la aŭskultantaro fariĝis pli kaj pli granda, oni elektis urban salanon, kiun poste oni ĉiam uzis, eĉ se la akcepto daŭre rondiras. Notinda estas ankaŭ la evoluo de la temoj. Ili distanciĝas de kelkaj jaroj de tre pacaj al pli polemikaj. Tio signifas ke la diversaj komunumoj, aŭ almenaŭ en ili tiuj kiuj partoprenas, pli bone konas kion ili dividas kun la aliaj, kaj nun serĉas pli ĉe la rando de la kredoj kaj praktikoj. De kelkaj jaroj, mi starigis ttt-ejon sur la interreto, kun la tekstoj de la prelegoj. La adreso estas <http://www.respublica.fr/kredanto/> interrel.

En Francio, la socio nun estas postkristana, postreligia. La kredantoj, almenaŭ la videblaj, ne plu estas plimulto. Ili do devas adaptiĝi al tiu situacio, kiu estas komuna al ĉiu religio. Tio estas pli facila por la ĉiam malplimultaj (judoj kaj protestantoj) ol por la antaŭnelonge malplimultaj (romkatolikoj kaj muzulmanoj — en iliaj landoj).

Tiu ekzisto de la religiaj grupoj en la kultura vivo de la urbo havas ankaŭ signifon. La religioj ne volas esti limigitaj

en la privata sfero, sed ankaŭ havi parolojn por la komuna vivo de la socio. Ili ekzistas kaj volas esti konataj de la homoj kaj instancoj.

Mi volas fini per ĝeneralaj rimarkoj rilate al la dialogo, ĉu ekumena, ĉu interreligia.

Mi unue volas indiki, ke laŭ mi ni devas rezervi la terminon „ekumena” al la dialogo inter kristanoj.

La fundamenta punkto de ĉiu tipo de interreligia dialogo, kaj tio validas same por ekumenaj renkontiĝoj, estas ke ĉiu partoprenanto estu firma en la propraj konvinkoj. En tiu tipo de dialogo, tute ne temas pri konstruado de iu mezo inter la konvinkoj, la kredoj. Temas pri agnosko de la alia, de ties diferenco, de ties konvinko, de ĝiaj fontoj, de ties vivo kaj praktiko.

La rezulto povas esti: konstato de tio kio estas komuna, kaj de tio kio malsamas.

Kompreneble, ĉiu povas, rajtas esperi, ke la alia alvenu al la propraj pozicioj kaj kredo, sed tio ne okazu dum la dialogo. Tiu dialogo ne signifas la ĉeson de evangelizo. Mi eĉ dirus ke tia dialogo devas okazi antaŭe. Ne eblas evangelizo sen antaŭa kono.

Fakte, tiu tipo de renkontiĝo ne renversas la limojn inter la religioj. Tie, la kredanto trovas sian identecon kaj komprenas tiun de la alia. Por li, la limo daŭre ekzistas, sed trans tiu limo troviĝas ankaŭ homo, kies kredo estas respektinda, eĉ kiam ĝi ne estas lia. La dialogo ne detruas la limojn sed preterpasas ilin por pli bona interkono kaj kunvivado.

Mi dankas.

Philippe Cousson

LA KREDO ESTAS DONACO DE DIO

„Nenie ni lernis el la vorto de Dio, ke la vorton de Dio kaj la religion ni devas disvastigi per flamo kaj fero” — instruis DÁVID Ferenc, dume en la tuta Eŭropo en la religimilitoj miloj da kristanoj mortis, kaj la aliel pensantoj, tiel nomitaj herezuloj, estis bruligitaj sur le ŝtiparoj.

En la jaro 1568, en urbo Torda (Transilvanio) estis proklamita la unuan fojon en la mondo la libereco de konscienco kaj religio. Ĉi tiun leĝon preparis DÁVID Ferenc. Fakte de tiam ekzistas la unitaria religio, la sola hungardevena religio.

DÁVID Ferenc naskiĝis en Kolozsvár (Cluj-Napoca, en nuna Rumanio) en 1510. Li lernis en Transilvanio kaj en Germanio, inter alie en Wittemberg (Vitembergo), kie li iĝis adepto de la Reformacio.

Tiutempe fondiĝis en Kolozsvár presejo, kies posedanto estis HELTAI Gáspár, kiu eldonis hungarlingvan tradukon de la Biblio. La tradukoj akcelis la disvastigon de la reformacio ankaŭ en Transilvanio.

Post eksterlanda lernado DÁVID Ferenc iĝis lernejestro en Kolozsvár. En latinlingvo aperis lia unua verkaĵo DIALYSIS, pri religiaj dogmoj. Poste lia naskiĝurbo elektis lin kiel ĉefpastro, li estis la kondukanto en la evoluado de la reformacio en Transilvanio. Kolozsvár fariĝis la centro de la reformacio kaj kulturo. En 1577 li iĝis la paroĥestro de hungaraj luteranoj, en Transilvanio.

Laŭ lia opinio la plej grava kaŭzo, ke kristanismo malboniĝis, troveblas en la

foriro el la Biblio. DÁVID Ferenc ne pensis, ke la reformo de la religio finiĝis kun LUTHER. Li opiniis, ke oni devas daŭrigi ĝin. Li ekkonis alian protestantan doktrinon, kalvinismon, kaj li trovis ĝin pli konforma al la Biblio. Li serĉis la akordiĝon de la luterana kaj kalvina tendencoj, sed kiam la transilvania reformacio dispartiĝis, li elektis kalvinismon. Tiam, la kalvinistoj elektis lin kiel episkopo.

Tiutempe en Transilvanio JÁNOS Zsigmond (janoŝ jigmond) estis la regnestro. Li estis protektanto de DÁVID Ferenc kaj nomis lin predikisto de la kortego.

DÁVID Ferenc ne ĉesis en la serĉado de la vero. Laŭ li: „Kiujn klarigas la Animo de Dio, tiuj ne rajtas silenti, nek kaŝi la veron”. La renoviĝo de kristanismo ne kontentigis lin kaj li faris radikalan paŝon: li rifuzis ĉiujn dogmojn, instruojn, tradiciojn, kiujn Jesuo NE instruis (la triunuon, la miraklan virgan naskiĝon, la diecon de Jesuo, la originan pekon ktp.), tiel komenciĝis la unitaria reformacio. La proklamo de la konsciencia kaj religia libereco donis vivon al la unitaria religio kaj eklezio. Mi citas nur la lastan frazon de la mondogma proklamo: „Al neniu estas permesate minaci iun ajn pro la instruado per malliberigo aŭ senhavigo de sia loko; ĉar la kredo estas donaco de Dio, ĝi estas el aŭdo, kiu ekzistas pere de la vorto de Dio”.

DÁVID Ferenc ĝuis plenan apogon de

la unitaria reĝo de Transilvanio, JÁNOS Zsigmond, tamen, li neniam misuzis la eblecon kaj neniam li disvastigis perforte, kun la rimedoj de la potenco siajn religiajn ideojn.

Kelkfoje malicaj akuzoj asertas, ke la unitarianoj ne estas kristanoj. Se la nomo de kristano signifas sekvanco de Jesuo, tiam ankaŭ la unitarianoj estas kristanoj, ja por ili la plej grava estas la instruado de Jesuo, pro tio ili estas nomitaj ankaŭ disĉiploj aŭ sekvancoj de Jesuo.

Cetere, la vorto unitaria unue estis menciita en 1600, kaj ĝi fariĝis la oficiala nomo de la eklezio en Transilvanio. La nomdono originas el la latina *unus est Deus* = „unu estas Dio”. Unitarianoj kredas je unueca Dio.

Kion signifas por ni la unueco? Kion koncernas por unitarianoj la unueco? Ĉefe al Dio. Sed tra Dio al ĉio: al la mondo, al la homo, al la leĝo, al la komuna celo. Koncerne de la homo ĝi signifas unuavice identan valordonitaĵon, la rekonon de la devo — jura kaj etika — unuece valida por ĉiuj homoj. La kondiĉo de la unueco estas la senembarasa ekzisto de malsimilaj homoj unu apud alia. Ili komune kreas la unuecon. Unitarianoj estimas ĉiujn homojn, ĉiujn kulturojn kaj religiojn.

Nia sola dogmo estas, ke ne ekzistas dogmo. Pro tio oni parolas pri libera religio, ke ĝi estas returnita aŭ renversita dogmismo, kiun karakterizas tio, kion ĝi ne kredas. La karaktero de unitariismo estas la gvidideo, ne la kredkonfeso. Ĉiu kredanto povas elformi sian kredon. Ĝuste pro tio estas deviga la religia toleremo, la akcepto de la malsamaco. Laŭ unitarianoj, ne ekzistas unu sola vera religio, kiel nek al monto-pinto kondukas nur unu sola vo-

jeto. Laŭ ni, la religio devas esti simpla, ĝi donu al la kredantoj forton kaj fidon en nia animo, vekigu serenon kaj netimon. Donu al ni la sopiron, ke ni volu similiĝi al la bona Dio kaj ni ne timu la punantan Dion.

En la epoko, kiam Jesuo vivis, la Leĝo kaj la Profetoj signifis la plej grandan aŭtoritaton. Jesuo metis Dion je la loko de la ĉefa aŭtoritato, kiun ni devas adori interne, en nia animo. En bonega apologo pri la kompatema samariano li demonstras la diferencon inter tiuj, kiuj obeas al la ekstera aŭ interna aŭtoritato.

La unitaria religio ne konsistas en la akcepto de metafizikaj dogmoj kaj kredkonfesoj, sed en la manifestado de la religia konduto en la etika vivo de la animo. Ties interna ekkono kaj ekstera esprimo okazas en ni kaj per ni. Tiel la fonto de la aŭtoritato ne ekster ni, sed en ni estas. Tiu estas pli granda kaj pli ordona ol ĉiuj eksteraj aŭtoritatoj. Ĉi tiu fonto, fakte, estas Dio mem, kiu helpas nin trovi la vojetojn de la intelekto kaj konscio, kiuj kondukas ĉiujn homojn al Dio. Kuraĝe ni devas fidi en la juĝo de la interna aŭtoritato, kiu alproksimigas nin al Dio.

DÁVID Ferenc mortis, kiel martiro en la fortikaĵa malliberejo en Deva (Transilvanio) en 1579, ĉar li ne volis perfidi la trovitan veron. Prefere li elektis la morton, sed li restis fidela sekvanco de Jesuo.

Mi deziras mencii, ke ne nur en Transilvanio ekzistas unitarianoj, sed ankaŭ en alia parto de la mondo. Cetere en Transilvanio ni havas 131 preĝejojn, el kiuj 52 estas historiaj monumentoj. La plej malnova unitaria paroĥo ankoraŭ funkcia, kies presbitero mi mem estas, troviĝas en

Kolozsvár (Cluj-Napoca). Unitarianoj vivas sur ĉiuj kontinentoj.

En Eŭropo: en la landoj Ĉeĥio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Grandbritio, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Latvio, Norvegio, Polando kaj Rusio.

En Azio: en Hindio, kun bona organizita eklezia vivo, Japanio, Pakistano kaj Srilanko.

En Sudameriko: en la landoj Argentino, Bolivio kaj Brazilo.

En Afriko: en la landoj Ganao, Niĝerio kaj en Sud-Afriko.

En Aŭstralio kaj Novzelandoj jam en 1850 konkeris unitariismo. En Usono, kie pli ol 1400 unitariaj pastroj gvidas la religian vivon, tie eĉ du Teologiaj Universitatoj funkcias.

En Kanado jam de longe organizita eklezia vivo ekzistas.

En 1954 unitariismo ekis ankaŭ ĉe la insularo Filipinoj kaj nun jam 19 pastroj plenumas benitan laboron.

Nuntempe en 2002, en Transilvanio — koncerne religion — paco regas. Ekzemple en mia urbo Kolozsvár-Kluĵo, la preĝejoj de diversaj religioj pace staras unu apud la alia, kaj post 1989 multajn novajn preĝejojn oni konstruas aŭ renovigas: ortodoksajn, romkatolikajn, grekokatolikajn, reformatajn, sed ankaŭ baptistajn.

Jam ne ekzistas kvereloj aŭ disputoj inter la diversaj kristanoj. Vane volus iu ajn malhelpi tiun religian pacon, ĉar inter la sincere religiaj kredantoj ne ekzistas limoj. Ĉi tiuj sincere religiaj homoj konas la du ĉefajn amordonojn de Jesuo:

„La Eternulo, nia Dio, la Eternulo estas unu; kaj amu la Eternulon, nian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj

La limoj el la kreo

LA HOMA RESPONDECO ESTAS LIMIGITA

Multaj el ni, inter kiuj ankaŭ mi, devis transiri unu aŭ plurajn limojn por povi atingi ĉi tiun belan lokon. Ĉikaze temas pri landlimoj. Sed ni bone konscias, ke tutan nian vivon difinas kaj determinas limoj. Ni estas homoj limigitaj, ĉar la limojn de nia vivokampo kaj vivoperiodo indikas naskiĝo kaj morto. La tagoj de niaj enmondiĝo kaj elmondiĝo formas la kadron de ĉiuj al ni donitaj tagoj surteraj. Cetere, ni estas limigitaj ankaŭ pro la fakto ke ni naskiĝis kiel virino aŭ viro, ke ni estas filino aŭ filo de ĝuste tiuj gepatroj, kiuj donis al ni vivon en jena tempo, kaj ke nia lulilo staris en ĉi tiu kaj ne en alia loko. Mi havas la taskon kun vi mediti pri tio, ĉu la Sankta Skribo al ni instruas pri limoj.

La vorton **Limo** D-ro Zamenhof prenis el la latina lingvo, en kiu ĝi signifas la limlinion konkrete markitan. Kromaj signifoj estas: vojeto, irejo, sed ankaŭ sojlo kaj eniro, aliro, transiro, pordo, **domo**, restado, loĝejo. Metafore: diferenco, di-



per via tuta forto. Kaj jen estas la dua: Amu vian proksimumon kiel vin mem. Pli granda ol ĉi tiuj ne estas alia ordono.

Ĉi tiuj sincere religiaj homoj, konante la amordonojn, havante ĉi tiujn sanktajn sentojn en animo, estas ege fortaj, malamo ne povas ilin venki.

Ni devas preĝi, ke en la tuta mondo ekregu la religia paco. Kiel diris Jesuo:

„Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar ili filoj de Dio estos nomataj”. Tiel estu!

‘SIGMOND Julia

stanco, komenco. Resume, dum sia evoluo tra la lingvo-historio **Limo** fariĝis riĉa, nuancoplena vorto.

Figure limo do povas estis **komenco**, vorto kiu tre facile gvidas nin al la unua paĝo de la Biblio, por la judoj la lasta paĝo, ĉar ili legas de dekstre maldekstren.

En la **komenco** (bereŝit) Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Vi scias, ke la Sankta Skribo enestas en ĉiu vorto, eĉ en ĉiu litero. La rabenoj multe diskutis inter si pri tio, kial la komenca litero de la Biblio ne estas **Alef** (= unu, unueco, Dio), sed **Beth** (= du, dueco, domo). La unua ĉapitro de Genezo impresas kiel bildriĉa poemo instruanta nin pri la maniero en kiu kreitaj homoj ordigu homan vivon kaj homan mondon. La tero fariĝu **unu domo**, kiu havigas lokon al ĉiuj, kiuj ekzercu sin kunvivi kiel gefratoj en unu granda rondo familia. Jen ankaŭ la instruo de la patrino de infano Ludoviko kaj la revo de matura ZAMENHOF.

Ni rigardu tiun literon **beth**. Ĝi havas la formon de domo, kiun limigas tri linioj. La baza linio indikas la fundamenton. Bone konstruu ĝin por ke ni havu firman grundon sub la piedoj. Jesuo poste parabolos: Saĝa homo konstruas sian domon sur roko. La plej supra linio indikas la tegmenton. Domo estas ejo en kiu homo povas sekure vivi, kvazaŭ subĉiele, sub la zorganta mano de Dio.

Sed tegmento ne povas ŝvebi en la aereo; ĝin portu fortaj muroj. Tiuj muroj malhelpu al ni ĉiam reflugi al tempoj pasintaj kaj konkeri forajn lokojn. Ĝi kvazaŭ devigas nin vivi ĉi-tempe kaj ĉi-loke. Kaj la alia flanko de la litero estas tute malfermita. Ĝi servu kiel fenestro al la mondo, al la aliaj homoj, al niaj ĉiutagaj taskoj. Jam tiu unua litero enhavas kompletan lecionon pri limoj, limoj

benon kaj bonon alportantaj.

Permesu al mi klopodi iom parafraze ekzegezi parton de la poemo pri la kreado.

Per la kulmino de Sia majesto, per kazo kaj koro, Dio donis limojn al la suprejo por ke ĝi estu bona ĉielo, loĝloko de la Plejaltulo; kaj Li starigis limojn al la subejo, por ke ĝi estu bona tero, lando kie vivu homoj kaj en kiu abunde fluu lakto kaj mielo.

Kaj la tero estis senorda kaj senborda, kompleta kaoso senlima, dezerta spaco ne aranĝita nek ekipita por ebligi vivon, praabismo plena de mallumo al kiu neniu limo vokis:

staru kaj haltu! Sed vidu! La spirado de Dio, kiel vento, kiel Pentekosta Spirito preskaŭtuŝe kaj ŝvebante pasis super („sur la vizaĝo de”) la abismo. Jes, ankaŭ la akvoj havas vizaĝon (sur-facon!).

Kaj aŭdu! Parolas Dio. Vidante absolute nenion pro la senlima mallumo, Li diris: „**Fariĝu lumo**”. Kaj Lia ordonanta kaj ordiganta Vorto tuj fariĝis Faro, ĉar **fariĝis lumo**. Jes, dum la tuta unua ĉapitro oni ade kaj ade subaŭdas en la verbo fariĝi la nomon de la Eternulo (JHVH). Nu, finfine Dio povis vidi, ĉar Li estu vidanta Dio. Kaj Li vidis la lumon, kaj pri la lumo Li esprimis tre pozitivan juĝon: ĝi estas bona. Lumo estas bona, t.e. ĝi ludas gravan rolon, vidigante mallumon, senordon kaj kaoson senliman. Per sia lumo Dio ne eliminis la mallumon, sed ĝin limigis, donante al ĝi fiksitan lokon kaj unikan nomon. Li faris apartigon inter lumo kaj mallumo, kaj denove Li parolis per vokanta voĉo: **lum**, kaj Li nomis ĝin tago. Kaj Li vokis la mallumon kaj nomis ĝin nokto. Per la nomo Li intencis indiki la limojn; per la nomoj **tago** kaj **nokto** ni povas kvazaŭ ĉirkaŭ-preni kaj kom-preni lumon kaj

mallumon. Ambaŭ havas sian apartan lokon kaj diktitan tempon. — Kaj sekvis mallumiĝanta vespero kaj sekvis relumiĝanta mateno:

Tago unu (*jom ehad*)

Por ĉiu tago Dio havas sian planon, sian programon. Kreante Li limigas Sin. Krei ordon bezonas lumon kaj tempon, alterne laboron kaj ripozon. Kaj en la frua mateno de la dua tago, bone ripozinte, Li denove malfermis sian buŝon por paroli. Kaj Li diris: „Fariĝu limojn fiksanta firmaĵo en la mezo de la akvoj, kaj ĝi apartigu akvon de akvo”. Tre grava estas tiu vorto **aparta** (= sankta). Ĝi estas ŝlosilvorto en la poemo. **Fariĝu lumo** kaj **fariĝis lumo** tekstis la unuataga programo, sed hodiaŭ **fariĝu firmaĵo** kaj denove tiu Vorto fariĝis Faro. Dio konstruis la firmaĵon, la firman tegmenton, la firmamenton, kaj apartigis la akvon subfirmamentan de la akvo superfirmamenta. Kaj fariĝis tiel! Ĉiuj akvoj, jen vivon donantaj jen vivon eĉ minacantaj, konusiajn limojn. Kaj Dio vokis la firmaĵon, nomante ĝin ‘ĉielo’. Kaj post la dua tago sekvis refreŝiga vespero kaj rosople-na mateno.

Kaj denove Dio frue leviĝis. Li bone atentis sian ripozon, ĉar la kreado postulis ĉiun energion de kapo, koro kaj manoj. Kaj Li rompis la silenton, dirante: Kolektiĝu la akvoj subĉielaj en unu lokon (*makom ehad*) kaj vidiĝu la seka lando limigita de akvoj. Kaj tiel fariĝis, ĉar Vorto kaj Faro ĉe Dio perfekte kongruas! Kaj aŭdu la ordonantan kaj ordigantan voĉon de Dio: Li vokis la sekajon, nomante ĝin ‘lando’. Kaj Li vokis la kolektitajn akvojn, nomante ilin ‘maroj’. Ho, kiom kontenta Dio estis, kiam Li vidis ĉi ĉion: ‘Bone estas!’ Kaj Dio pensis: iam simile kolektiĝu

la homoj, kie ajn loĝantaj, kaj ili kunfluu en unu lokon, templon, sinagogon, moskeon, domon de preĝado kaj festado, aŭskultado kaj lernado. En unu Berrekfürdő! La trian tagon Dio multe laboris, ĉar Li daŭrigis paroli: Elkreskigu la tero verdaĵon, kampokreskaĵojn, flo-rojn, plantojn kaj arbojn, kaj ĉio havu siajn limojn laŭ sia speco. Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio vidis — estas bone! ‘Por hodiaŭ sufiĉas’, diris Dio. ‘Mi nepre devas limigi Min, ĉar morgaŭ venos nova tago!’ Kaj sekvis verda vespero kaj fruktoplenta mateno. La tria tago.

Kaj Dio leviĝis la kvaran tagon por starigi lampojn sur la ĉiela plafono. Kaj Li memoris, ke Li jam apartigis tagojn kaj noktojn, fiksinte iliajn limojn. Sed Li deziris distingi la lampojn ankaŭ laŭ speco por indiki festotagojn kaj ordinaraĵajn tagojn, de jaro al jaro: unu speco por la tago, granda lumo, kaj unu speco por la nokto, malgranda lumo. Tiel li kreis lumojn por majstri la tagon kaj majstri la nokton, la sunon kaj la lunon kaj la stelojn. Abundu lumo por ke poste homoj trovu sian vojon sur la tero. Dio donis al ĉiuj tre apartajn destinon kaj lokon, kun taskoj limigitaj, kiam Li fiksas ilin sur la plafonon ĉielan. Jes, la Kreanto estas distinganta Dio. Distingado ja ebligas al ni vere homiĝi; la homo apartigu bonon de malbono, lumon de mallumo.

Kaj en la fino de la kvara tago Dio rigardis ĉirkaŭen kaj Li vidis ke estas bone. Sekvis vespero kun kreskanta mallumo sub luno kaj steloplenta ĉielo, kaj sekvis mateno vidiganta la sunleviĝon.

Jam frue sonoris la vekhorloĝo flanke de la lito de Dio. Sekvos laboroplenta tago. Kaj aŭdu, kiel Dio kreis moviĝantajn bestojn grandajn kaj etajn, sur la kampoj, sub la aero, en la arbaro kaj la maro, ĉiujn laŭ ilia speco. Kaj fine Li benis

ĉiujn bestojn, por ke ili multiĝu. Kaj Dio diris: „Morgaŭ Mi kreos la aliajn bestojn kaj nelaste la homon!” Kaj sekvis vespero plena de bestaj sonoj kaj kantoj, kaj sekvis mateno post virkoka kriado. La kvina tago.

Komenciĝis la sesa tago. Matene Li kreis la ankoraŭ mankantajn bestojn, dirante: ‘estas bone’. Bone estas nun atingi la kulminon de la kreado, ĉar Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan laŭ Nia formo. Ne laŭ lia aŭ ŝia speco. Kaj Li donis taskon, respondecon kaj komision al viroj kaj virinoj: „Limigu vin rilate al viaj rajtoj, ĉar rajtoj viaj samtempe estas devoj. Reĝe gardu kaj flegu, zorge servu kaj konservu ĉion kion Mi kreis”. Kaj kiel Dio benis la bestojn, Li same benis la homon, la homaron. Ne regu sed reĝu! Ne ekspluatu sed kreu kulturon, loĝeblan teron! Fruktu kaj multiĝu, kiel Mi vaste disdonas fruktojn por vivi kaj feliĉiĝi, kaj kiel multas Miaj faroj de amo, graco kaj kompatemo.

Ho, kaj en la fino de tiu apoteoza tago Dio rigardis ĉirkaŭen, ĝuante ĉion kion Li estis kreinta. Kaj Li vidis: Estas tre bone! *Tov meod!* Certe, la okuloj de Dio ne estas la niaj...

Dio kreis la homon, kiam la tuta tero jam estis preta: Kaj por Adam sufiĉis nur la paradizo, la ĝardeno. Kaj la homo ne devis tuj ataki laboron, ĉar havis antaŭ si jam la sabaton. Kvazaŭ Dio volis diri: Mi kreis vin por la festo!

Konsiderante ĉi tiun belegan biblian poemon, ni tuj komprenas ke Dio helpis al la homoj donante al ili respondecon, sed samtempe limigante ĝin. Homa vivo konu limojn, mezurojn por ebligi reĝan kaj reĝinan vivon.

La unua mezuro estas mezuro de tempo. Mi ne responsas pri la tuta eterneco, pri ĉiuj tempoj, sed nur pri la hodiaŭa

tago (*Jom ehad*). La hieraŭo jam pasis, la morgaŭo necertas, sed mian limigitan respondecon mi konu nune, ĉitage, hodiaŭ. Granda beno.

La dua mezuro estas mezuro de loko (*makom ehad*). Mi ne responsas pri la tuta universo, pri ĉiuj landoj de la tero, sed nur pri la kampo aŭ ĝardeno, kiun mi servu kaj prilaboru. Mia viv- kaj labor-tereno estas limigita: ne tie sed ĉi tie. Tiel mi povas spiri kiel libera kaj feliĉa homo, sciante ke mi vivu hic et nunc, ĉi tie kaj nun. Denova beno.

La tria mezuro estas mezuro de amo. Same kiel mi absolute ne povas respondi pri ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj, mi ne povas respondi pri ĉiuj homoj. Ni povas konfesi: „Mi amas ĉiujn homojn”, sed en la konkreta, ĉiutaga praktiko de nia vivo tio ne montriĝas vera kaj ebla. Dio diras al ni: „Amu la homojn, amikojn kaj malamikojn, kiujn vi renkontas ĉi tie kaj nun, ĉi tiun tagon kaj sur via propra kampo, en via propra ĝardeno. Tio estas granda limigo, kaj tria beno per kiu Dio benis nin.

Resume, la Biblio vidigas nin, kiel la kreanta Dio limigis sin al sestaga programo. Al ĉio Li donis fiksitan lokon kaj difinitan horon. La unua ĉapitro instruu al ni, ke nin gvidu ordo, disciplino, distingado, por ke ni kune konstruu indan domon por la homaro.

Por hodiaŭ sufiĉas scii, ke la mezuroj de tempo, loko kaj amo validas ankaŭ dum nia kara KELI-konferenco, kiu okazas en ĉi tiu ĉarma vilaĝeto, dum ĉi tiu semajno kaj kun ĉi tiuj aliĝintaj gefratoj. Ke ni kune konstruu kaj faru novajn paŝojn, sub la benantaj manoj de la Sankta Spirito, ŝvebanta ankaŭ super nia kongresejo, pli fortan KELI-domon, kristanan Esperanto-movadon kreskantan, por ke pli da homoj senlime, tutani-

Limoj estis la temo de la KELI-kongreso en Berekfürdő. Temo pli vasta kaj pli profunda ol unu aspekto. Tion ni rimarkis en la daŭro de la semajno. Ekzistas ne nur landlimoj sed ankaŭ multaj alispecaj limoj, limoj inter homoj, limo de kapableco, inteligenteco, tolereemo k.t.p. [...].

En la Aĝoj de la apostoloj ni legas en la unua ĉapitro ekde versiklo 6:

Ili do [la apostoloj, kiujn li elektis] veninte demandis lin, dirante: Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Israel? Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervis en Sia aŭtoritato. Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin; kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalemo kaj en la tuta Judejo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero. Kaj tion dirinte, li suprenleviĝis, ankoraŭ dum ili rigardis, kaj nubo ricevis lin for de iliaj okuloj. Kaj dum ili fikse rigardis al la ĉielo, kiam li foriris, jen staris apud ili du viroj blanke vestitaj, kiuj ankaŭ diris: Viroj Galileanoj, kial vi staras ridardantaj al la ĉielo? ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel



me kaj amoplene interfratiĝu trans limoj de loko kaj tempo. Por ke alvenu la Regno, kiun Jesuo promesis kaj kies alveno ni pasie sopiras. Dio donu, ke ni havu benoriĉan, fruktodonan kaj lumoplenan konferencon, kiu malfermu neatenditajn perspektivojn kaj nutru espergavedajn atendojn.

Jacques TUINDER
4-8-2002

same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon. Tiam ili iris returne al Jerusalemo de la monteto nomata Olivarba, kiu estas proksime de Jerusalemo, en la distanco de sabata vojaĝo.

La disĉiploj tiam pasis limon, limon inter la ĉeesto de la Sinjoro kaj lia foriro. Ankaŭ ni pasos baldaŭ limon, limon inter nia restado tie ĉi kaj nia disirado. Kion faris la disĉiploj je la alia flanko de la limo? Ni povas legi pri tio: Ili iris returne kaj ili persistis en preĝado kaj petado.

Kion ni faros? Tion respondu ĉiu por si mem. Alia demando estas: Kion ni kunportos de nia kunesto ĉi tie? La respondo povus esti: Interesajn sciindaĵojn, amikecon, spiritan varmecon, pli da fido, pli fortigigitan kredon. Mia preĝo estas ke ni ricevu la benon de Dio ĉi tie kaj ke ĝi akompanu nin ĉiam kaj ĉien. Amen.

Wil VAN GANSWIJK
Preparita vesperpreĝo
<wvganswk@s4all.nl>

BALTIA ALTERNATIVO

Esperanto estas lingvo internacia — almenaŭ tian celon ĝi havis dekomenca. La renkontiĝoj, kie oni havas alian komunan lingvon krom Esperanto, povas aspekti iom nenature (alvokoj pri „lingva disciplino” ks.); kaj ne malofte oni preferas ĉie krom oficiala programo uzi la nacian lingvon — „por pli facila kompreno”; komencantoj, observante iujn „aktivulojn”, eĉ ne havas stimulon por lerni Esperanton ĝis perfekta nivelo. Do, tre gravas okazigo de vere internaciaj renkontiĝoj. Universalaj kongresoj estas bona afero, tamen unue, ne ĉiuj havas tiom da mono, kaj due, en milhoma

amaso malfacilas „vidi la okulojn”, trovi eblecon por sincera interparolo. Ideala E-renkontiĝo, miaopinie, devas esti ne amasa (ĝis ĉ. 100 personoj), internacia (ne estu alia komuna lingvo krom Esperanto), kaj laŭeble kun iu antaŭanoncita temo, interesa por ĉiuj partoprenantoj. Pli frue al mi bonŝancis viziti nur unu tian renkontiĝon — Internacian Literaturan Forumon (Gdańsk, 1995). Ĝus okazis la alia.

La unua *Balta Esperanto-Forumo* pasis en Kaliningrad 14–18 jul 2002. La loko estas facile kaj libere atingebla el pluraj eŭropaj landoj. Ĝuste pro tio ĝin elektis ges-roj H. Gorecka kaj A. Korjenkov, kies plurjara laboro donas al ni *La Ondo de Esperanto* — eble la plej bonan ĉiumonatan revuon, kaj multajn legindajn librojn. Dank’al klopodoj de tiu senlaca paro ni espereble havos tradician Esperanto-aranĝon, alternativan al ne plu atingebla por ni BET, destinitan por ne tro junaj personoj, kiuj ne ŝatas tendumadon kaj bruon diboĉadon, sed preferas seriozan programon en bona Esperanto.

En BEF partoprenis ĉ. 100 personoj el 11 landoj. Notindas, ke poloj pli multis ol ruslandanoj, ke venis homoj el Moskvo, Murmansk, N. Tagil kaj Tomsk, ankaŭ el ne-baltaj Ĉeĥio, Slovakio, Francio kaj Svislando. Salutleterojn al la Forumo sendis prezidanto de UEA R. Corsetti kaj vickonsulo de Esperanta Civito L. Trifonĉovski.

Solena malfermo okazis en la Urbodomo, kun ĉeesto de pola konsulo Jan Czubiński kaj lokaj oficialuloj. Raportoj pri la Forumo aperis en lokaj gazetoj kaj TV, kun emfazo de aparta situo de Kaliningrad kaj ebla graveco de Esperanto por eŭropa integriĝo.

Okazis prelegoj kaj seminarioj pri re-

giona kunlaboro en Nordio kaj en Balta regiono, pri ekologio de Balta maro; rakontoj pri historio de Prusio, pri la vivo kaj filozofio de Imanuel KANT. Tre interesa estis la duonhora kun litova parlamentano (la vorto „sejmano” povus kaŭzi por legantoj misajn asociojn) S. Kružinauskas. Grava estis la literatura parto: seminario pri kritiko, prelego pri V. Varankin lige kun ties centjariĝo; prezento de la unua volumo de Dostojevskij en Esperanto (el planata kvinvolumenta verkaro), kaj de la nova traduko de *Eŭgeno Onegin* (eldonota en 2003); memprezentoj de la kunlaborantoj de *La Ondo de Esperanto*. Furoris la kviza vespero laŭ sistemo de FREŜO, organizita de M. Zdankowski (konjektu, kiu gajnis la unuajn premiojn en ĉiuj konkursoj...). Eksterlandaj gastoj povis konatiĝi kun la rusa kulturo en la vespero de rusaj romanoj.

Ni vizitis la muzeon de Oceano (ankaŭ la faman esplorŝipon „Vitjaz” kaj militan submarŝipon), buse ekskursis tra la urbo, veturis al Svetlogorsk kaj tie ĝuis la maron.

La loĝkondiĉoj estis sufiĉe bonaj el nia vidpunkto (tamen ankaŭ eksterlandanoj ne plendis; la plej pretendemaj loĝis en luksa hotelo). Ĉiuj eroj okazis laŭ la programo (disdonita dum registrado) kaj — imagu! — komenciĝis ĝustatempe.

Oni povas bedaŭri nur, ke ĉio tiom rapide finiĝis. Mi ŝatus esperi, ke la Balta E-Forumo evoluos simile al la Urala: ŝanĝos sian titolon komence al Semajno, poste al Dekado...

Do kiam vi en venontaj jaroj vidos anoncojn pri Balta Esperanto-Forumo en Kaliningrad — vi jam scios, ke tiu aranĝo estas vizitinda.

Valentin MELNIKOV

Informo pri la inundo kaj la sekvoj por la eldonejo KAVA-PECH... kaj la peto

Telefone mi eksciis de filino jam en Brazilo, ke en miaj eldoneja stokejo kaj ekspedejo kaj en garaĝo estis akvo en la alto pli ol 2 metroj, sed ankaŭ, ke ŝi sukcesis savi la aŭtomobilon kaj veturigi ĝin al sekura loko kaj savis ankaŭ komputilon kun la presilo el la ekspedejo, kaj eĉ parteton de libroj. Sed la inundo iris tiom rapide, ke plejparto de la libroj, libra tranĉmaŝino kaj multaj aliaj ekipaĵoj restis sub akvo.

Post mia reveno de Brazilo la akvo ne plu estis tie, mi kun kelkaj amikoj, kiuj sindone helpis al mi, tuj komencis forĵeti ĉion. Mankis elektra energio, telefono, sed precipe akvo, kiu mankas eĉ hodiaŭ la 22an de aŭgusto, dum mi skribas ĉi tiujn liniojn. La akvo en la putoj estas infektita, do oni ne allasas ĝin eniri la akvokondukan sistemon kaj ĉiam kiam mi ekaŭdas la signalon, mi kuras kun aliaj loĝantoj por ekhavi akvon de la suraŭtomobila akvujo. Tamen, la elektra energio jam estas kaj ekde hieraŭ jam funkcias unu el miaj telefonaj linioj.

La stokejon mi ne havis asekuritan, vere neniu eĉ en sonĝo povis imagi, ke la akvo transiros altan barilon kaj la ŝtelistoj ja ne interesiĝas pri stokejoj de libroj. La valoro de la libroj, kiujn mi devis forĵeti, estas proksimume 50000 EUR, de tio pli ol triono libroj en Esperanto aŭ por Esperanto (lerniloj, vortaroj).

Mi ne nomas tion katastrofo, ĉar la vivo jam instruis min, ke estas pli altaj valoroj en la vivo ol posedi ion. Kaj kompare kun aliaj, kiuj estis pli trafitaj, mi havas sekan loĝejon kaj savitajn multajn

teknikajn ekipaĵojn. Do — mi akceptas, kion ne eblas ŝanĝi, same kiel mi devis akcepti pli dolorigajn perdojn, ekzemple morton de mia 28-jara kaj komplete sana bofilo, kiu postlasis mian filinon kun kvarmonata bebo (imposto de aŭtomobilismo) kaj sekve forpason de mia edzino Stanjo pro rapida kancero. Mi ne plu okupiĝas pri „kio povus esti, se ...”, sed rigardas la estontecon, kiun mi ne vidas komplete nigra.

Danke al Dio mi ne plu havas iujn ŝuldojn, kiujn mi devus repagi, krome mi havas iom da ŝparita monrezervo por ne devi rezigni pri mia firmao kaj povi rekomenci ankaŭ kun la eldonejo. Eĉ restas savitaj stok-partoj de tri bone vendeblaj libroj, *Novaĵoj en ortografio* (en la ĉeĥa), slovaka-ĉeĥa kaj ĉeĥa-slovaka vortaro de malsimilaj vortoj kaj *Gramatiko de Esperanto*. Krome mi jam reaĉetis kelkajn ekzemplerojn de miaj libroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio por povi plenumi eventualajn mendojn. Tamen, bedaŭrinde komplete malaperis lernolibroj de Esperanto kaj vortaroj, ĉiu Esperanto-beletro inkluzive la novaĵojn *La skandalo pro Jozefo, Rakontoj ne nur ŝercaj* kaj *Les bases de l'espéranto*, kiujn mi prezentis unuan fojon dum la ĉijara UK, kaj ĉiuj fakaj libroj en Esperanto.

Feliĉe malfruiĝis tri planitaj eldonaĵoj, *Kantolibro* honore al Stanjo, *Ilustrita frazeologio* de la aŭtoro duopo Sabine FIEDLER kaj Pavel RAK kaj *Kompleksia medicino kaj akupunkturo Sa-am* de Puramo CHONG. Se ili estus jam produktitaj, ankaŭ ili estus malaperintaj komplete.

Kiel skribite pli supre, restis al mi iom

Internacia Fotokonkurso

Post kvar sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la kvina Internacia Fotokonkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo. En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajt-

da ŝparita mono, kiun mi dediĉos al reeldono de kelkaj libroj en la ĉeĥa por resti en subkonscio de ĉeĥaj librovendistoj kiel eldonisto. Sed apenaŭ restos nun mono por realigi miajn eldonejajn planojn rilate Esperanton (krom la verko de Puramo CHONG, kies eldonon li mem afable komplete financos), ne rigardante al nepre bezonata novelldono de la verkoj jam eldonitaj, kiuj tamen malaperis sen povi atingi legantojn. Forŝovi por longa tempo mi devos du ĉefajn verkegojn de la ĉeĥa klasika literaturo, jam ankaŭ preskaŭ prespretajn: *La bravan soldaton Ŝvejk* de J. HASEK kun ilustraĵoj de J. LADA kaj *Malnovajn ĉeĥajn mitojn* de A. JIRASEK kun ilustraĵoj de M. ALES. Kaj komplete mi rezignas pri finskribo kaj eldono de mia verko pri Japanio kun koloraj fotoj, pro kiu mi planis ankoraŭfoje viziti Japanion ĉivintre por kompletigi miajn fotografiajn faritajn pli frue kaj konsulti la tekstojn. Tio nun restas komplete nereala, sed eble mi povos reveni al tiu projekto post iom da jaroj.[...]

Kun amikaj salutoj samideane,

Petro

as partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10x15 cm. Fotoj povas esti koloraj kaj nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj.

Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unu-ekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando).

La fotoj devas atingi la sekretarion antaŭ la 15a de decembro 2002.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: 50 eŭroj kaj abono al „La Ondo de Esperanto”

2a premio: 25 eŭroj kaj abono al „La Ondo de Esperanto”

3a premio: abono al „La Ondo de Esperanto”

Specialan premion (libroj de „Sezonoj” kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2004 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

Halina GORECKA

Esperantistoj ekspozicios en Egmond (Nederlando)

Dum la periodo 8 julio — 5 aŭgusto multaj havis la okazon admiri pentraĵojn de la fama edzoparo esperantista Rita kaj Franz-Georg RÖSSLER (ambaŭ naskiĝis en 1949 en Germanio).

Franz-Georg frekventis la humanisman gimnazion kaj post muzikinstrua ekzameno en Mannheim/Heidelberg li instruas en la gimnazio Nikolaus-von-Weis en Speyer ĉe Rejno.

Jam en la lernejo li konstante okupiĝis kun bilda formado, sed li komencis intense labori ekde la 90aj jaroj. Konata li estas ankaŭ kiel komponisto kun koncertoj kaj radiaj disaŭdigoj. Aperis dume okdedo da verkoj en pluraj eldonejoj kaj dudekkvino da publikigaĵoj pri poeziaj, biografiaj kaj muzik-sciencaj temoj.

Rita laboris, post la flegistina ekzameno, kiel fakgvidistino en malsanulejo en Ludwigshafen ĉe Rejno. Poste ŝi ekstudis fluton kaj muzikinstruadon ĉe la muzikaltlernejo en Mannheim/Heidelberg. Nune ŝi laboras kiel deĵorantino ĉe muziklernejo kaj docentino en popolaltlernejo.

La unuajn artajn impresojn ŝi ricevis en ekspozicioj, poste ŝi alproprigis aŭtodidakte kaj kurse la diversajn bildigajn teknikojn. Multajn librojn ŝi verkis kunaŭtorine kun sia edzo. Ŝian laboron pregas daŭra evoluo en pluraj grafikaj kaj pentraj teknikoj.

La edzoparo havis la unuan ekspozicion en 1994 en la propra regiono; ĝis nun sekvis preskaŭ kvindek en urbejoj kiel Stokholmo, Prago, Budapeŝto, Montpeliero kaj Berlino, sed ankaŭ en pli malgrandaj urboj kaj vilaĝoj. Multajn

ekspoziciojn akompanis propraj prelegoj kaj koncertoj. Kaj ĉiam ili aldonas, ke ilia Esperantisteco forte kontribuis al la bilda, muzika kaj literatura agadoj!

La titolo de la ekspozicio en Egmond estas psalme inspirita: *Mi levas miajn okulojn al la montoj: De kie venas al mi helpo?* (Ps 121,1) kaj rilatas al bildoserio kun alpaĵ motivoj. Samtempe ĝi peruspirite pli profundan dimension.

La nepre vizitinda ekspozicio okazis en la renkontiĝejo de la abateja kandel-fabriko en Egmond-Binnen. Lunde kaj marde kiel gastiganto gesamideanojn akceptis Esperanton parolanta Jacques Tuinder, kiu tiujn tagojn kutime voluntulas ĉe la monaĥoj.

Jacques TUINDER



Kara Redaktoro

Mi gratulas nin (KELI-anojn) pro la nova aspekto de *Dia Regno*. Necessas nun, ke artikoloj en *Dia Regno*, kadre de kristanaj aferoj, estu diverstemaj por igi ĝin interesega legaĵo, eldonante poemojn, proverbojn, bildrakontojn, rakontojn, ktp.

Al nia *Dia Regno* bela mi persone dediĉas min — ke verke kaj / aŭ alimaniere laŭ alvokoj mi partoprenos en ĉio kio temas pri ĝia plibonigo.

Kristanan saluton

Sincere,

Pastoro Olúwábùnmi Gabriel
NASHÓ-DAVIES

Solvo de la ŝarado 835

1. eklezio
2. parabolo
3. ikono
4. sarkofago
5. tedeumo
6. ordini
7. liturgio
8. orgeno
9. Jeremia

Kromsolvo: epistoloj



Dio benu!

Estimataj Gesinjoroj!

Dankon pro la surprizo. Hodiaŭ mi ricevis du numerojn de „*Dia Regno*” kaj mi tuj ilin tralegis. Estas interesaj, belaspektaj, en pli praktika formato. Gratulon! Tamen vere tro malmulte de la Evangelio — pri *Dia Regno*! Ĝenas min ankaŭ la lingvo: tre komplika kun multaj kunmetaĵoj kaj participoj!!! Ŝajnas al mi, ke la lingvo estas pli bela, se ĝi estas simpla kaj komprenebla. Verŝajne tia estis la celo de Zamenhof.

Korege mi salutas Vin kaj deziras ĉiujn gracojn de Dio.

Pastro Józef ZIELONKA



Anonc-peto

Mi estas evangelia pastoro, parolanto de E-o kaj la angla, kiu volontule servos dum du jaroj ĉe iu organizaĵo kristana aŭ eklezio.

Bunmi G. OSHO-DAVIES
96, Olaiya St., Mafoluku, Oshodi,
Lagos, Niĝerio

Reago

Mia persona letero al s-ro COUSSON ial ajn aperis surpaĝe de DR kaj provokis kelkajn reagojn. Unu el ili sonis eĉ minace: oni ja rajtus procesi kontraŭ mi.

Se oni rajtas, oni agu. Mia vidpunkto estas neniom mia: la sola gvidlibro por distingi bonon disde malbono estas la Biblio, kiu diras:

Kaj kun virseksulo ne kuŝu kiel oni kuŝas kun virino: tio estas abomenaĵo (Vaikra / Levidoj 18:22).

Kaj se iu kuŝis kun viro kiel kun virino, abomenaĵon ili ambaŭ faris: ili estu mortigitaj ilia sango estu sur ili (Vaikra / Levidoj 20:13).

Tial Dio fordonis ilin al malhonoraj pasioj; ĉar iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan; Kaj kiel same ankaŭ la viroj, forlasante naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al alia, kaj viroj kun viroj faris hontindaĵon kaj ricevis en si mem la taŭgan rekompencan de sia malvirto (al Romanoj 1:26-27).

Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio (1a al Korintanoj 6:9-10).

Senkomente via,

Yenovk LAZIAN

Kanto

1. ||: Kiu petolas tra la tag' sen la plag' de l' laboro,
sen serioza ag' — ĉu li taŭgas por ni? :||

||: Ni viglas frue en maten' fortas dum la taga pen',
restas ĝis la nokt-alven' sub la Dia ben'
Lia gaja kristanar', ekumena fratar'. :||

2. ||: Se vin la homoj sur la strat' scivoleme demandas:
„Nu, kien via pad'?", diru simple: „Al Di'”. :||

||: Malsamaj ni laŭ konfesi', sed en bela harmoni'
Dion kune iras ni: unu eklezi'
Unu gaja kristanar', ekumena fratar'. :||

(Gottfried WOLTERS; Albrech KRONENBERGER 05.08.2002)



La parko de la kongresejo (fotis PC)